

Eŭropa Bulteno

Oktoebro 2018, Numero 185

DUA EKSPOZICIO PRI TRADUKADO ĈE EESK



Je la 19-a de septembro 2018 malfermiĝis en la ĉefa konstruaĵo de Eŭropa Ekonomia kaj Socia Komitato (EESK) la dua eldono de la pasintjara ekspozicio pri tradukado, ĉi-foje sub la titolo "EU speaks your language" (EU parolas vian lingvon), kadre de la Eŭropa Jaro de Kultura Heredaĵo.

Ĉi-jare ĝi okazis sub la gvido de la departemento pri Komunikado de EESK, kiu pli koncentrigis ĝin al strikte EU- rilataj temoj kaj la fama "Regulacio 1/58" pri la lingvoj de EU, kiu ĉi-jare 60jariĝas, kaj sekve ĝi mallongigis aŭ tute forigis erojn kiujn ĝi konsideris nenecesaj, kiel interalie bedaŭrinde la eron pri Esperanto, la traduka laboro de Zamenhof kaj la kontribuo de Esperanto al la establiĝo de la scienco pri terminologio. Anstataŭe estiĝis eroj pri (ne-)tradukado en politikaj diskutoj antaŭ la Unua Mondmilito, fruaj dokumentoj en la kvar unuaj oficialaj lingvoj de EU, la estiĝo kaj evoluo de "Opinioj" en EESK kaj ties tradukiĝo (kun klarigo de la "pivota" sistemo kun la angla, franca kaj germana lingvoj kiel

perantoj inter malpli grandaj lingvoj). Tamen Esperanto ne tute forestis: ĝi reprezentigis per po unu ekzemplero de la Biblio (afable pruntita de FEL) kaj de la "Somermeznokta sonĝo" de Ŝekspiro.



Okaze de tiu malfermo oni organizis diskuton pri multlingveco en EU, en kiu partoprenis ankaŭ la Vicprezidantino de EESK kaj respondeculino pri Komunikado, Isabel Caño Aguilar, kaj la konata franca filosofino Barbara Cassin kiu verkis plurajn librojn pri la temo. Laŭ sinjorino Caño, "la ekspozicio baziĝas sur la ideo ke la eŭropaj lingvoj estas komuna kultura heredaĵo de la Eŭropanoj, kaj ke plie multlingveco devas esti agnoskita kiel unu de la bazoj de la Eŭropa Unio. Ĝenerale, tiu elmonro honorigas la centran rolon de tradukado kaj interpretado kaj la gravecon de tiu laboro por ĉiuj Eŭropanoj. (...) Certe sen la helpo de niaj tradukistoj kaj interpretistoj neniu inter ni povus labori aŭ produkti la tiom atendatajn opiniojn. Se niaj ellaboraĵoj atingas sian kutiman kvaliton, tio estas danke al la

lingva laboro de tiuj gekolegoj kaj al ilia motiviĝo. La procedo de ellaboro, adopto kaj publikigo de tiuj opinioj estus multe pli malfacila se ni ne havus la eblecon pensi kaj labori en nia denaska lingvo."

Meze de oktobro la ekspozicio translokiĝis al la konstruaĵo de EESK/KdR kie troviĝas ties getradukistoj (kiuj pro laborŝarĝo ne povis ĉeesti la unuan malfermon), kaj je la fino de oktobro ĝi translokiĝos al la Ĝenerala Direkcio pri Tradukado (DGT) de la Eŭropa Komisiono. Ankaŭ la Konsilio esprimis sian intereson gastigi la ekspozicion poste, sed la konkretaj datoj ankoraŭ ne estas fiksitaj.

Sandra Schweder

ESPERANTO KAJ POLITIKO

Esperanto-movado dum sia tuta historio klopodis kontakti politikistojn je ĉiuj niveloj komprenante ke sen ilia subteno ne eblas serioza antaŭenmarŝo en la socio. Fojfoje estis sukcesa tia kontaktado, fojfoje okazis ke iu esperantisto iĝis grava politikisto kaj multaj esperoj estis ligitaj al tiaj personoj (siampe aŭstra ŝtatprezidanto Franz Jonas kaj jugoslavia prezidanto Josip Broz Tito). Tamen el tiuj plej superaj rilatoj en fina konsekvenco restis

nenio. Montriĝis ke individua subteno de unuopuloj je superaj pozicioj neniel sufiĉis pro manko de relative amasa subteno de politikaj fortoj (aŭ la voĉdonanta popolo aŭ almenaŭ kelkaj fortaj partioj).

UEA havis en sis strategio rilatojn al Unuiĝintaj Nacioj kaj atingis dufoje gravajn politikajn agnoskojn (la unua kaj dua deklario de UNESCO subtene al E-movado) sed pli ol tio estas iluzie eĉ pensi. Je la nivelo de unuopaj ŝtatoj oni atingis similajn rezultojn kiel la sukceso de poloj antaŭ kelkaj jaroj kiam la Pola E-kulturo estis proklamita ŝtatnivele nacia pola kulturheredaĵo. Individuaj personaj kontaktoj havis lokajn kaj tempolimigitajn sukcesojn kiel ekz. fruktodona kunlaboro inter Kroata E-movado kaj Nikola Ŝegota, tiama vicprezidanto de Kroata parlamento – kiu kontribuis al akcepto de leĝo ene de kiu KEL estis regule financata de la Kroata Loterio dum deko da jaroj aŭ kontaktoj kun Ĉaploviĉ, vicprezidanto de tiama Slovakio kiu subtenis okazigon de grava konferenco pri lingva problemo en Slovakio kaj sendis leteron al registaroj de ĉiuj EU-landoj petante subtenon al konkludoj de tiu konferenco aŭ kontaktoj kun Ljudmila Novak, eŭropa parlamentanino, kiu organizis ekspozicion pri Esperanto en Eŭropa Parlemejo en Bruselo kaj petis diskuton pri E en Komisiono por kulturo de Eŭropa Parlemanto. Estis sufiĉe multaj okazoj kiam altaj ŝtataj funkciuloj partoprenis en gravaj E-aranĝoj, ĉefe UK-oj kaj salutis la kongresojn kaj la laboron de Esperantistoj. Kaj fine en la lasta mandato de Eŭropa Komisiono (la plej supera organo de EU) EEU sukcesis interesigi ties komisionanon Vytenis Andriukaitis ekagi por Esperanto. Ni celis sukcesi per li interesigi la Eŭropan Komsilion pri edukado pri uzo de E en propedeŭtika funkcio en eŭropaj lernejoj. Badaŭrinde mankas tempo, ĉar lia mandato finiĝas post malpli ol unu jaro kaj la klopodoj efikis tro malrapide. Tamen ankoraŭ restas iom da espero.

Espéranto

Langue commune équitable pour l'Europe

Circonscription Île-de-France

01 Laure Patas d'Ilhiers	16 Didier Janot
02 Jérémy Bizet	17 Hélène Marlin
03 Anna Lo Jacono	18 Jérôme Auclair
04 Gaston Riera	19 Georgette Huet
05 Elisabeth Barbay	20 Jean-Marie Meunier
06 Emmanuel Debanne	21 Florence Luguern
07 Isabelle Nicolas	22 Michel Bizet
08 Bernard Cornevin	23 Isabelle Devis
09 Michèle Abada-Simon	24 Nicolas Viel
10 François Lo Jacono	25 Véronique Berthe
11 Fanny Errant	26 Djémil Kessous
12 Gérard Fillien	27 Marie-Christine Body
13 Annette Julien	28 Lucien Bresler
14 Pierre-Yves Poulard	29 Elisabeth Lambert
15 Maryse Vonnet	30 Jasmin Ordenez

Liste présentée par :



Soutenue par :



En la politika agado lastatempe ekzistas kelkaj ekzemploj unikaj: klopodo atingi politikan subtenon en la amasoj. Tiusence fondiĝis antaŭ deko da jaroj unua politika partio kiu celas batali por Esperanto kaj demokratio: EDE. Ĝi jam partoprenis en du eŭropaj balotoj kaj pretigas sin por la tria en printempo 2019. Dum la unuaj du balotoj ĝi sukcesis aktivi nur en Francio kaj Germanio kaj en Francio atingis 30.000 voĉojn (ĉirkaŭ 0,03% de la voĉdonantoj) kio ne estas granda rezulto sed

konsiderante tion ke ĝi aktivis nur en unu lando tio estas bona rezulto. Se EDE havus siajn sekciojn en almenaŭ 15 plej fortaj EU-landoj, ĝi gajnus preskaŭ duonmilionon da voĉoj kaj pri tio la politikistoj ne povus silenti.

Tamen ankaŭ tiel – EDE decidis plu partopreni, ĉar tio ebligas al ili disdoni informojn pri EDE kaj Esperanto al centmiloj da francaj civitanoj, kio estas per si mem grava sukceso. Tiusence mi invitas ĉiujn francajn esperantistojn subteni EDE kaj reklami ĝin laŭ siaj kanaloj. Alia internacia organizaĵo kiu havas politikan karakteron estas AVE (Asocio de verdaj esperantistoj), kiu ne agas kiel partio, sed grupigas esperantistojn interesitajn pri verda politiko kaj kunlaboras kun verdaj partioj en kelkaj landoj.

Zlatko Tišljarić

CULTUURMARKT OOSTENDE 30.09.2018 KULTURMERKATO EN LA KULTURCENTRO DE GROTE POST

Ĉiun jaron la Kulturkonsilio (Cultuurraad) de Oostende organizas grandan foiron por ebligi al la “kulturaj asocioj” de Oostende montri sian aktivecon kaj agadojn. La loko estas tre prestiĝa: De Grote Post estas la antaŭa moderna poŝtoŭicejo kiu translokiĝis al pli vasta tereno. Ĉiu asocio ricevas (senpage!) budon kun ĉiuj bezonataj iloj.

La Konko, ostenda sekcio de Flandra Esperanto-ligo, prezentis ne nur Esperanto-librojn kaj revuojn sed speciale fotojn de sia ampleksa agado en Afriko. Pro tio la temo estis Esperanto Wereldwijd = Esperanto tutmonde. La vizitantoj miris malkovri ke Esperanto tiel aktive partoprenas en helpprojektoj por la Sudo kaj tiu fakto certe pligrandigis iliajn interesojn. Ĉu pro tio ili pli facile iĝos esperantistoj? Ni nur povas esperi...

Aliflanke mi mem spertis ke puŝi la homojn al la legado de artikolojn de la Eŭropa Bulteno sur la ekrano de nia komputilo estas nekutima sed bona maniero por pruvi la internacian dimension de nia lingvo. Kiam mi malrapide kaj laŭvoĉe legis, ili estis surprizitaj ke ili komprenis preskaŭ ĉion! Samtempe ni ja pruvis ke Esperanto aktivas tutmonde, rigardante la diversajn paĝojn de la Eŭropa Bulteno!

Sed kia surprizo kiam la Skabeno pri Kulturo vidis sian foton en la EB! Evidente ni ankaŭ raportis pri la Lingva Festivalo de 28.04.2018, kaj montris la foton de la Skabeno Bart Plasschaert inter grupo de ostendaj Nepalanoj. Bedaŭrinde la foto de nia budo fiaskis, kaj ni nur povas montri la ŝildon de la evento. Kompreneble La Konko jam enskribiĝis por la venonta jara Kulturmerkato!

Flory Witdoeckt

EKSPOZICIO EN LA AŬTONOMA UNIVERSITATO DE MADRIDO

Inter la 15a kaj 25a de oktobro eblas viziti ekspozicion pri Esperanto, en la halo de la Fakultato pri Homsciencoj de la kampuso de Cantoblanco de la Aŭtonoma Universitato de Madrido. Ĝin konsistigas 15 paneloj, eldonitaj de Hispana Esperanto-Federacio, kaj antaŭnelonge renovigitaj, okaze de la kongreso de Esperanto organizita en samspeca fakultato de la universitato UNED.

Ni memorigas ke la paneloj troviĝas je la dispono de la grupoj kaj esperantistoj dezirantaj diskonigi la lingvon en sia urbo. Se vi disponas je kontaktoj kun eduka aŭ kultura institucio, la Federacio pruntas la ekspozicion tute senpage, kaj eĉ zorgas pri la kostoj de transporto. Kontakto kun la Federacio se vi havas ŝancojn kaj intereson.

BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ 2019

Litova Esperanto-Asocio invitas partopreni la 55-ajn tradiciajn Baltiajn Esperanto-Tagojn, kiuj okazos inter la 6-a kaj 14-a de julio, 2019 en Litovia urbo Panevėžys. Detalaj informoj estas en la Informa Bulteno de BET-55

http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET55&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=16&PHPSESSID=6d6b00f05f8a0c335fbe898066b16b2d

Retejo de BET-55, kie eblas trovi ĉiujn aktualajn informojn, estas

<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55>

Reta aliĝilo al BET-55 estas ĉi-tie http://esperanto.lt/aligxilo_BET.html?ckattempt=1

Partoprenu mem kaj invitu la aliajn. La aranĝo estos vere multnombra, interesa kaj utila.

Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

LINGVAFEST' 2018 – LA UNUA INTERNACIA LINGVA FESTIVALO EN SLOVAKIO

Lingva festivalo estas publiko evento, dum kiu lingvaj institucioj (lernejoj, eldonejoj...) povas prezenti sin, kaj kie la publiko povas senpage ekkoni diversajn lingvojn dum prelegoj kaj lecionetoj. Tiaj eventoj okazas interalie en Berlino, Moskvo kaj Minsko, sed ĝis nun neniam en Slovakio. Tio estis ŝanĝita la 28-an kaj 29-an de septembro, kiam okazis en Bratislavo LingvaFest', la unua lingva festivalo en Slovakio. Ĝi estis plejparte organizita de E@I (helpe de SKEF kaj la Ekonomia Universitato), laŭ modelo de lingvaj festivaloj de Dennis Keefe, kun kelkaj modifoj kaj riĉigo de la programo.



La programo estis efektive tre riĉa: dum du tagoj estis entute 105 programeroj. La vizitantoj povis ĉeesti rapidkursojn de 24 lingvoj, ekzemple la hispana, franca, rusa, germana, sed ankaŭ

malpli ofte lernataj lingvoj (belorusa, daria, taja, hebrea, indonezia, hindia) kaj de konstruitaj lingvoj (klingona, navia kaj memkompreneble Esperanto).

La prelegoj estis tre diversaj: aplikaĵoj por lerni lingvojn, la romaa en Slovakio, kiel vivi kun surdulo, kiel lerni lingvojn tradukante per Vikipedio, ktp. Prelego, kiu surprizis eĉ la organizantojn, estis prezento de Filipinoj: knabo flugis el Filipinoj ĝis Slovakio nur por partopreni en LingvaFest' kaj prezenti sian landon tie! Plej multaj prelegoj estis en la slovaka (aŭ ĉeĥa), kelkaj estis en la angla. Tre atendita programero estis tiu kun Bella Devjatkina: ŝi estas 6-jara knabino el Rusio, kiu parolas 8 lingvojn. Ŝi venis de Moskvo kun siaj gepatroj kaj ŝia patrino Julija klarigis (ruse kaj angle) kiel ŝi edukas sian filinon kaj atingis tiun mirindan rezulton.

Ne mankis ankaŭ kultura programo: okazis koncertoj de JoMo, kiun ĉi tie ne plu necesas prezenti (li sukcesis kanti en 25 lingvoj!); de Steve Lin, tajvanano, kiu kantas slovake, kaj de Suvereno, fama slovaka repisto, al kiu plaĉis la ideo de LingvaFest' kaj akceptis fari koncerton senpage.

La festivalo ricevis multajn vizitantojn (oni taksas ĉ. 1500 homoj) – ĉefe la unuan tagon, kiam busplenoj da lernantoj venis kun siaj instruistoj. LingvaFest' 2018 estis sukceso kaj okazos denove en 2019. La E@I-teamo jam planas diversajn novigojn, interesajn programerojn kaj specialaĵojn, por kontentigi ĉiujn.

LingvaFest' ricevis sufiĉe buntan atenton de la ekstera publiko – jen ligilo kun kolektitaj artikoloj kaj aperos en amaskomunikiloj: <http://www.lingvafest.sk/lingvafest-en-gazetaro/>
Fotogalerion de la evento oni povas trovi ĉi tie:

https://photos.google.com/share/AF1QipOJ0BAWE__RdaRVXa5IUIhpWzR0PyiqByT-TgsL8gMbgxhgYOGxsyn2eowpyfkhbw?key=M0R4STVNZnAtT0hFUVBIRmpGd3c0dTNSd1FNOFdB

Matthieu Desplantes

LA UNUA CIVITANA RENKONTIĜO EN KASSEL

La 1-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo okazos inter la 15-a kaj 18-a de novembro 2018 en germana urbo Kassel, organizata de la urba administracio

La aliĝilo akj detaloj troviĝas en la retejo:

www.europa-union-kassel.de/buergerbegegnung-2018/

La renkonto volas aktivigi civitanojn de Kassel en civitana poreŭropa agado, do estas neesperantista aranĝo.

Estas tamen aparta Grupo Esperanto en la projekto. Ni nun preparis tri modulojn de ĉi tiu grupo. La detaloj montriĝas el la respektiva alkroĉitaĵo.

Ni do ja kore invitas esperantistojn partopreni la eventon. La modulo 2 traktos la temon "Eŭropa identeco kaj la rolo de Esperanto« - kriterioj kaj praktikaj aspektoj por la ĉiutaga vivo de eŭropaj".

Wolfgang Guenther

ESPERANTO-SEMAJNO EN PRINSENTUIN EN LEEUWARDEN (NEDERLANDO)



La semajno okazis inter la 26-a de agosto kaj 6-a de septembro 2018. „Festi vian lingvon en libera ŝtato.“ estis elirpunkto de ‘*Lân fan taal*’ (Lando de lingvo). En 2018 Leeuwarden estas kultura ĉefurbo de Eŭropo. La lingva festivalo ‘*Lân fan taal*’ estas grava parto. Multaj institutoj kaj personoj en Frislando kaj (foraj) ĉirkauaĵoj kunlaboras por doni estontecon al plurlingveco. Vivigi lingvojn, ludi kun lingvoj kaj paroli ilin.

En la apuda ĝardeno estas grandegaj paneloj trilingvaj, ankaŭ en Esperanto. En la Prinsentuin (Leeuwarden) estas konstruita speciala pavilono ‘MeM’, kio estas la hejmeca ĉambro en la formo de du virinaj figuroj, kiuj reprezentas la du lingvojn: la frisan kaj la nederlandan. „Mem“ estas la frisa nomo por panjo. En MeM vi povas trinki kaj manĝeti ion. Funkcias kiel publika restoracio.

Dum la tuta somero tridek lingvaj komunumoj prezentiĝas. Ankaŭ Esperanto. Dum nia semajno ni okazigis mallongajn Esperanto-kursojn kaj prezentojn por la vizitantoj de MeM-pavilono. Dum 7 tagoj ni prizorgis informbudon pri Esperanto. Sub la titolo „Tio kion vi delonge volis demandi pri Esperanto...“ Dum lundo vagadis tra la parko 2000 studentoj por ricevi informojn pri studenta vivo en Leeuwarden. Dum la lasta dimanĉo multaj homoj venis al Prinsentuin por vidi kiuj teatraĵoj, muzikprezentoj, ludoj okazos en la venontaj monatoj. Estis bela vetero, do ni metis nian informbudon ekstere! Disdonis multajn informilojn. Ni organizis tri sukcesplenajn koncertojn por ĉiuj kiuj vizitis la MeM-pavilonon. Esperantistoj kaj ne-esperantistoj aŭskultis la muzikon de Kajto-kvarope, Radio Esperanto kaj Jonny M. Dum du sabatmatenoj estis rekta elsendo de Omrop Fryslan, la tutprovinca radio-kompanio. Unue estis intervjuo kun Ankie, Nanne kaj Andries. Ankie kaj Nanne, kiu nun formas Kajton, faris prezentos dum la rekta elsendo. La dua sabato estis intervjuo kun Yves, Marc kaj Jonny M, kaj la lasta faris prezenton.

Esperanto-tago – sabaton, la 1an de septembro 2018.

La unuan de septembro okazis diversaj prelegoj: nederlandlingvaj kaj en Esperanto. Ward de Kock prelegis pri la frisa Esperantisto Wijtze Nutters, Marc Konijnenberg rakontis pri siaj

spertoj dum la staĝo en Bialystok. Said Baluĉi (prezidanto de Esperanto Nederland) prelegis pri: 'Kial Esperanto aparte gravas por aziaj intelektuloj?' Katalin donis provlecionon. Anoj de Nederlanda Esperanto-Junularo plenigis kun prelego la lastan horon. Jonny M (Germanio) faris bonan koncerton. Multaj junaj homoj ekdancis. Kaj ne nur Esperantistoj! Dimanĉe ni invitis ĉiujn partopreni interesan urban promenadon, kiun gvidis oficiala urba gvidisto Marcel. Dmitri lerte faris la tradukon en Esperanto. Dimanĉeposttagmeze ĉiuj kaftrinkantoj/manĝantoj en MeM povis aŭskulti la avantaĝojn uzante Esperanton dum vojaĝoj, pri Pasporta Servo. pri Amikumu. Tra la mondo per Esperanto! Fine: Kun-Kant-Kanonado kun Kajto. Ĉiuj, kiuj emas kanti, povis kunkanti. Kantante ni transdonis la bastoneton al la Rusoj.

La organizadon ĉefe efektivigis Andries kaj Ineke, sed dum la semajno multe helpis: Yves, Ingvo, Piet, Bert, Katalin, Dmitri, Korine, la prelegantoj, la muzikistoj. Kune ni povas rerigardi al sukcesplena semajno.

Ineke Emmelkamp
www.esperanto-nederland.nl
<https://lanfantaal.nl/>

BALKONA PROJEKTO

Oni atentigis min atentigis min pri la jeno: Je la 4-a horo posttagmeze, la 10-an de novembro, dekoj da grupoj dise en Eŭropo proklamos Eŭropan Respublikon. Ilia celo estas eki diskuton pri tio kiel antaŭenigi EU-on, plisamigi la rajtojn de EU-civitanoj ktp. Legu pli ĉi tie: <https://europeanbalconyproject.eu/en/>
Eble iuj emas aliĝi, aŭ fari ion similan hejmloke.

Ronaldo el Nederlando

INTERESA FOTO



Sandra Schweder sendis al mi ĉi tiun foton el iu germana blogo. Verŝajne iu muntaĵo. Tamen interesa. Konsideru ĝin ŝerco.

La redaktoro

LA SEPA PARTO EL LA LIBRO »IDENTEKOJ« RESUMO

1. **Homo estas socia estaĵo** (socio estas minimume 2 personoj, se ili evoluigas reciprokajn konfidon kaj komunajn kredojn)
2. **Homo kontentigas sian sociemon en multaj socioj samtempe** (grupoj), kiel familioj, amikaj rondoj, societoj, lokaj komunumoj, vilaĝo aŭ urbo, regiono, popolo, religio ktp. **Ĉiu el la grupoj evoluigas socian (grupan) identecon** (komunajn celojn, elementojn de samtempa konduto, komunajn ceremoniojn, folklorajn kaj kulturon, elektas sian gvidantaron)
3. **Unuopulo en sia vivo aliĝas al novaj kaj forlasas malnovajn grupojn** (familion, en kiu oni naskiĝis oni forlasas kaj fondas la propran aŭ plurajn proprajn, el unu urbo oni translokiĝas al alia kaj oni ŝanĝas sian lokan apartenon, aŭ eĉ la religion aŭ patrujon – foje pro translokiĝo, foje pro tio, ke oni forprenas ĝin de ni (ekzemple post militoj...))
4. **Identecojn de forlasitaj grupoj oni ne perdas** (post fondo de la propra familio oni ne ĉesas esti membro en sia naskiĝfamilio, post forlaso de la patrujo kaj iompostioma akcepto de la nova oni ne forgesas la malnovan...) kvankam la grado de la aparteno iome malfortiĝas.
5. El tio sekvas, ke estas normale **al la jam ekzistantaj identecoj aldoni novajn**, kia ekzemple estas la eŭropa identeco. Kun la alprenado de nova identeco **oni ne forviŝas la malnovajn** (ekz. popolan, regionan, religian ktp)
6. **La ĉefa signo de identeco estas lingvo** (se ni akceptas, ke ĉiu varianta de lingvo aŭ dialekto estas aparta lingva sistemo). Ekz. publikloke ni parolas la lernitan nacian lingvon, en sia vilaĝo ni parolas regionan aŭ lokan dialekton, en strata bando ni parolas bandan slangon, en familio ni parolas familian varianton de la loka dialekto, kun etaj infanoj ni parolas varianton de infana lingvo, kun handikapita infano ni parolas adaptitan lingvon, kiun ĝi kapablas kompreni ktp)
7. **Lingvo havas du samgravajn bazajn funkciojn: la komunikan kaj la identecan.** Kiam tiuj du roloj konfliktas inter si, pli gravas la identeca funkcio (ofte ni intence parolas sian minoritatan lingvon, kvankam ni scias, ke oni ne komprenas nin, ĉar tiam la celo ne estas komuniki sed montri sian apartenon)
8. **Nova identeco (ekesto de nova kolektivo) nepre necesigas la ekziston de nova identeca lingvo, kiu estas diferenca de ĉiuj aliaj, ĉar ĝi devas esti neŭtrala.** Tiu lingvo signas la novan apartenon (eŭropan). Tiun lingvon devas akcepti apartenantoj de la nova komunumo emocie (ne nur racie) kiel sian, ili devas havi emocian rilaton al ĝi. Kaj tio estas ebla nur, se por ĉiuj apartenantoj de la nova komunumo ĝi estas la sama, sed diferenca de ĉiuj aliaj komunumoj. Koncerne la eŭropan lingvon, la angla ne povas fariĝi identeca lingvo, kvankam ĝi jam servas kiel komunika lingvo kaj ĝi ne povas kontribui al la evoluigo de eŭropa identeco, ĉar la eŭropa identecolingvo devas esti neŭtrala rilate al ĉiuj membroj (la angloj kaj irlandanoj ne rajtas esti privilegiitaj) kaj ĝi devas nepre diferencii de identecolingvo de USONO, ke Eŭropanoj estu fieraj pri siaj valoroj, kaj ke sian fieron rilate la apartenon ili montru parolante sian kaj ne amerikan lingvon. Kompreneble, ke la identeca lingvo transprenos ankaŭ la rolon de la komunika.
9. **Neŭtralan lingvon oni povas akiri je tri manieroj:**
 - a) **elektante nacian lingvon, kiu apartenas al neniu el la popoloj, kiuj aliĝas al la nova komunumo**, ekz. la araban. Tian solvon oni elektis en ekskoloniaj landoj, kiel la angla en Bharato (Hindujo) aŭ Niĝerio, la franca en iuj afrikaj landoj ktp.

- b) **elektante iun el la mortaj lingvoj**, kiujn oni povas revivigi, sur kies bazo elkreskis historie eŭropa kulturo, kiaj estas la latina aŭ la malnovgreka. Tian solvon elektis israelanoj, kiam la mortan hebrean ili renovigis kaj »revivigis«.
- c) **Elektante iun el la novlatinidaj lingvoj, kiujn iniciatis lingvistoj aŭ iuj movadoj kiel Esperanto**, (kiu evoluigis dum sia pli ol 130-jara historio apartan kulturon kaj lingvan trezoron). Tian solvon oni elektis en Indonezio kaj en kelkaj aliaj polineziaj landoj (Bahasa indonesia estas lingvo, kiun baze de malaja lingvo ellaboris lingvistoj reguligante plane la gramatikon meze de 1950-aj jaroj kaj tiun lingvon nun uzas 300 milionoj da homoj).

Sovetunio kaj Jugoslavio ne konsciis pri la identeca funkcio de lingvo, kaj ili klopodis evoluigi sovetan respektive jugoslavan identecon uzante la lingvon de la plej granda popolo, kiu ja servis kiel komunika lingvo, sed ne povis esti akceptita kiel lingvo de komuna identeco, ĉar ĝi ne estis neŭtrala. Tial ili ne sukcesis evoluigi komunan novan identecon. En kriza tempo tio estis sortoporta kaj esence influis al la disfalo de tiuj plurpopolaj ŝtatoj.

Sen solvo de tiu problemo Eŭropa Unio disfalos okaze de pli grandskala ekonomia aŭ politika krizo.

Zlatko Tišljár

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de oktobro 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Sandra Schweder, Matthieu Desplantes, Zlatko Tišljár, Flory Witdoeck, Wolfgang Guenther, Ineke Emmelkamp, Ronaldo el Nederlando

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

